

Morto de Zaha HADID (1950-2016), angla-iraka arkitektino.

fontoj: www.lemonde.fr/ <http://projets-architecte-urbanisme.fr/> www.elerno.cn/ www.amc-archi.com/ <http://www.arcspace.com/> <http://www.batiweb.com/> www.flickr.com/

Zaha HADID estis fama arkitektino kaj fama persono pro multaj kialoj: ŝia deveno, ŝia personeco kaj ŝia mirinda kaj tute nova volum-koncepto.

Ŝi estis irak-devena ino, kiu rajtis studi, kaj ŝi iĝis mondfama arkitektino, kies laboro estis kreiva kaj avangarda.



En 2004, ŝi estis la unua ino, kiu ricevis la premion PRIZKER (*kaj dek jarojn poste ŝi estas ĉiam la sola!*) La saman premio ricevis Paulo Mendes da Rocha, Wang Shu, Frei Otto, Jean Nouvel, Shigeru Ban, ktp.



Muzeo Artoj XXIa jarcento Romo

En 2015, ŝi ricevis la prestiĝan anglan premion STIRLING, kiu rekompencas la plej bonan art-konstruaĵon de la jaro por la Nacia Muzeo de l'Artoj de la 21-a jarcento (MAXXI) en Romo. Ŝi laboris per kurbaĵoj, same kiel antaŭe la fama franca arkitekto Le Corbusier, laboris per rektaj linioj (*en 1955, La Poemo de la Rekta Angulo*). Fakte ambaŭ revoluciigis arkitekturon. “Verdire, ili laboris rekte laŭ teorioj de Albert Einstein” laŭ F Edelman en “Le Monde” 2016.



Galaxy Soho Zaha HADID

En 2011, Zaha HADID deklaris: “Mi opinias, ke tra nia konstru-arto, ni povas donaci antaŭ-rigardon al alia mondo, entuziasmigi, proponi ideojn, interesigi. Nia arkitekturo estas intuitiva, radika, internacia kaj iniciatema”.

Ŝi jam kreis multajn skizojn, bel-artaĵojn, dezajnaĵojn, ktp antaŭ ol havi la unuan arkitekturan mendon. Ekde 1979, ŝi kreis sian propran oficejon, kie nun laboras ĉirkaŭ 250 homoj; ŝi laboris dum tridek jaroj tra la tuta mondo kaj ĉiam zorgis pri “la *uzantoj, tro ofte forgesitaj*”, kiel ŝi diris. Cetere ŝi instruis en Harvad kaj en Chicago (Usono) same kiel en Vieno (Aŭstrio).



*Skulptura omaĝo al
Andrea di Pietro dalla
Gondola*

Ŝi kreis la fajro-brigadejon de la entrepreno de mebloj Vitra (Lörrach –Germanio); dum du jaroj ĝi estis uzata de la fajrobrigado, sed laŭdire tiu konstruaĵo naŭzis la fajro-estingistojn pro internaj kurboj! Do ĝi nun utilas kiel eksponejo de mebloj kaj eĉ festo-ĉambrego. Ekzistas nun nova fajrobrigejo malproksime...!




*Fajrobrigadejo - Vitra
ĉe Weil-am-Rhein 1990-94*

Fakte Zaha HADID studis matematikon antaŭ ol studi arkitekturon, kaj ofte ŝajnas, ke ŝia laboro devenas de la renkonto de ambaŭ fakoj.

“Zaha HADID estas senkrona reĝino de aktuala arkitekturo. Ŝiaj konstruaĵoj klare indikas, “Mi estas hadida!” Zaha HADID, bonfida kreintino, sendube estas la plej fama ino en iu mondo, kiun viroj strange regas” (citaĵo de Martin Sørberg).

Legantinoj tion certe ne opinias stranga... ĉar delonge ĉiuj fakaj laboroj estas praktikataj de viroj!

Sed certe, estonte, pliaj akirtektinoj famiĝos: ekde 2013, (almenaŭ en Francio) ĉirkaŭ kvarono de arkitektoj estas jam arki-



tektinoj, *sed kun duon-salajro kaj ... okupantaj plej ofte malpli altajn postenojn.* Ĉu ĝis nun ili ne estis sufiĉe kreivaj!

Kris KEZER